



# CIAO !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 8 (23), Aŭgusto 2006

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor' Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**www.esperanto-chicago.org/**

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – d-ino Gertrude Novak  
Kasisto – Karlo Gunn

### Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

### Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

### Bonvenon!

Antaŭ la XXXV-a datreveno de la Societa oficiala registriĝo **d-ro Puramo Chong** konsentis doni lokon en sia kliniko por nia libraro kaj arkivo. Koran dankon al nia Vic-prezidanto! Pri la jubileo mem legu sube, sed nun – interesa informo pri la plej grava E-evento de la 2006.

### 91-a UK en Florenco

Se pasintjare ŝikaganoj kvinope partoprenis UK-on en Litovio, ĉi jare la plej fama E-kolektivo de Ilinujo ne estas prezentata. Pro tio mi provos transdoni la etoson de la grava E-forumo sur la paĝoj de nia bulteno dank'al kongresa kuriero *Florenca Lilio*, kies emblemon mi 'pirate' uzas



(s-ro redaktoro, pardonu) kaj eĉ italigis titolon de nia bulteno. Itala kongreso estas la tria en vico, kie kunvenis pli ol 2000 e-istoj (2209). Se 'plenkreska' kongreso jam estas 91-a, ja 'infana' kongreseto jubileas, ĝi estas la 50-a! Pri tio skribis la kuriero en la unua n-ro. Dua n-ro – solena inaŭguro, la kongresanojn salutis UEA prezidanto R. Corsetti, substrekinte, ke "Esperanto naskiĝis en Florenco.., ĉar tie naskiĝis la moderna pensmaniero, kiu metis je la centro la homon. Sen Renesanco, sen Florenco, ne ekzistus Esperanto." Kiel Davido (simbolo de Florenco kaj de la Kongreso) venkis Goljaton, ankaŭ ni venkos; ni venkos se ni batalos por la lingva justeco. Por ravigi tiujn vortojn, jen Kongresa Limeriko de Otto Prytz:

Simbol' de kongres' en Florenco:

la eta David' sen potenco

venkanta giganton.

Ĉu ne Esperanton

ektrafos la sama tendenco?

Denove furoris la Kleriga Lundo, kiam organizantoj propones 15 seminariojn laŭ plej diversaj temoj: movadaj, kulturaj, sociaj, klerigaj, amuzaj., kiel Renesanco aŭ virtoj kaj malvirtoj de italoj tra la okuloj de eksterlandanoj. La salonoj plenis, la homoj estis kontentaj.

**Skandaleto** okazis vendrede, kiam oni anoncis rezultojn de la belartaj konkursoj en salono Minnaja de la kongresejo. Tamen tuj poste la sekretario de la konkurso, Michela Lipari, anoncis, ke la rezultoj de la konkurso ankoraŭ ne estis publikaj, kaj absolute neniu rajtas ricevi la liston de gajnintoj. Malgraŭ ĉio ni gratulas ges-ojn-gajnintojn kaj deziras al ili plurajn sukcesojn.

Fine, la urbestro de Jokohamo Nakata Hiroshi prenis kongresan flagon kaj sincere invitis ĉiujn al sia urbo – gastigonto de UK en 2007.

## UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio  
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o  
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio  
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/poll.ram>

## Laste okazis

Ege interese pasis la lasta kunsido de la ESŜ: kvar samideanoj rapostis pri siaj ŝatataj E-verkoj. Komencis preleg-serion s-no Karlo Offutt, rakontinte pri du bildstriaĵoj el Japanio: *Nudpieda Gen* de Nakazawa Keizi kaj *La Flambirdo* de Tezuka Osamu. Lin postsekvis viskonsiano Marko Ŝafrot, prezentante unu-aktan dramon *Gardu vin bone kontraŭ la ĉinologoj!* Interesa peco de E-literaturo, kion oni povas ĝui rigardante de-sur la scenejo. Poste pri siaj adorataj E-poemaroj prelegis Gregoro Dolgin: ĉiujn tri li verkis kaj eldonis mem. Literaturan parton finis Viktor Pajuk, leginte pecon en propra traduko el la rakonto *La brodita mondo* de J. Vynnyčuk, populara nuntempa ukraina verkisto.

\* \* \*

Samtempe la Societon vizitis du gastoj: Klaas Dijkstra (NL-BE) kaj Boris-Antoine Legault (Montrealo, CA). Ili vigle rakontis pri sia E-vivo. Klaas kiel programisto laboras por iu usona firmao kaj Boris, biologo, planis per buso vojaĝi al San Diego (Kalifornio), kio bezonas pli ol du tagojn. D-ino Novak kaj mi aranĝis por gastoj viziton de Navy Pier, Millenium Parko, fontanaro, Adler-planetario. Ili estis mirigitaj de Miŝigan-lago, Kamp-muzeo, Sears Turo. La ekskurso finiĝis en restoracio. (K. Offutt)

Nia kara nederlanda s-no forgesis menciigi pri la 400-a jubileo de sia samlandano **Rembranto H. van Rijn** (1606-1669) – fama pentristo kaj grafikisto. En siaj verkoj li uzis krepuskan lumon, kvazaŭ lumigantan figuron dronantan en tenebro. Tio ebligis al li reliefigi psikologie la trajtojn de la vizaĝo, kvazaŭ oni vidus la animon de la persono. Konservigis kelkcent liaj pentraĵoj kaj grafikaĵoj, estis verkitaj pri li multaj romanoj, ĉar lia vivo estis tre kortuŝa (morto de la unuaj infanoj kaj poste de la edzino Saskia, perdo de havaĵo pro ŝuldoj, morto en malriĉeco). Jen unu el 60 memportretoj (*red.*)



\* \* \*

Dum la kunsido estis proponita festi 35-jaran jubileon de la Societo piknike en arbaro, eble – dimanĉe, la 24an de Septembro. Kion vi, nia kara membro, opinias pri tio? Bv reeĥi kaj kontakti redakcion.

**Laste aperis:** en tri numeroj de ukrainlingva semajna gazeto *Tempo kaj eventoj* estis publikigitaj materialoj, ligitaj kun E-o. En unua n-ro – artikolo pri d-ro Chong kaj lia kliniko; du ukrainaj tradukoj de originalaj E-rakontoj; granda intervjuo kun nia prezidanto Viktor Pajuk. Imitinda afero por aliaj periodaĵoj!

**Okazos:** komencante de 3a de Septembro TV kanalo Peralta.TV elsendos la 16-partan video-kurson *Pasporto al la Tuta Mondo*. Filmon produktitan de ELNA en Bay Area direktoris Judith Montell, premiito de Academy Award. Plian informon oni povas ricevis de ELNA per tel. (510) 653-0998 aŭ vizitante retejon [www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org).

**Grave:** kiu dume ne pagis kotizon, bv kontakti nian kasiston K. Gunn!

## Sekvantaj kunsidoj:

**22an de Aŭgusto** – interŝanĝo per sperto, akirita somere: UK, ELNA-kongreso, E-mondo

**26an de Septembro** – eble estos anstataŭigata per pikniko okaze de XXXV-jara jubileo

**Antaŭ 35 jaroj, la 30an de Septembro 1971, estis oficiale registrita “Esperanto Society of Chicago”. Salutoj estas bonvenataj!!!**

**24an de Oktobro** – 150-jara jubileo de I. Franko; estraran-proponoj por 2007, elektado okazos novembre

Denove tra la mondretejo rampis



araneoesp @ yahoo.co.uk